

# *La Riverrego* kebekia esperantista bulteno

Junio 2006

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 21, No 84

## Kvara MEKARo

*Martin Benoit*

En la longa semajnfino de majo, ekestis tradicio inter Otavo, Montrealo kaj Toronto organizi MEKARon. Esperantistoj el Kebekio, el Ontario kaj eĉ el Usono partoprenis ĝin en agrabla kaj amikeca etoso. Ĉi-jare la vico estis al Otavo.

Mia koramiko Marc-Philippe kaj mi foriris aŭte el Montrealo sabaton matene, por alveni iom malfrue al la decidita renkontpunkto, apud la kanada parlamentejo. Tie ni vidis dekon da Esperantistoj tuj forirontaj por viziti la ĉirkaŭaĵojn. Komencis pluveti, kaj mi estis forgesinta mian pluvombreton en la hotelĉambro! Ian de Otavo ĉiĉeronis por gvidi nin apud la parlamentejo kaj la kluzoj de la Rideau-kanalo. Jen alvenis pluraj aliaj esperantistoj el Montrealo! Eĉ la Bostonanoj alvenis. Marŝante, forĝisto alvokis nin, ni ĉirkaŭis lin kaj lian forĝotablon. Li tiam eksplikis al ni (angle) el kio konsistas la metio de forĝisto, kun bona humuro. Li montris al ni bazajn trukojn, kaj interŝanĝe de unu dolaro, Marc-Philippe akiris belan S-hokon. Poste ni vizitis la Bytown-muzeeton, pri historio de Otavo. Ni lernis pri la konstruo de la kanalo, pri la vivo tiam kaj

pri la murdo de Thomas D'Arcy-McGee.

Je la dektria, estis tempo iri al la itala restoracio Carmello's, ĉe angulo Cartier kaj Cooper. Aliaj Esperantistoj el Otavo atendis nin tie. Post pli ol unu horo da atendo je malsato, alvenis tre bongusta manĝo! Mi manĝis kvadratan spican picon. Babilante pri io ajn, agrablis la etoso. Post la tagmanĝo, estis tempo iri ĉe la Otavan universitaton. Kelkaj marŝis tien, aliaj tien veturis. Bruce Krisp prezentis sinsekve la kvin prelegantojn. Francisko Lorrain

ridigis nin per sia teatraĵo pri kio la bovinoj estas tiel perfektaj, pacemaj ke estas tute neeble ne preni ilin kiel ekzemplon por la tuta homaro! Suzanne Caron-Richer montris al ni anamorfozoin, pentraĵojn kiujn oni ne povas vidi bone sen meti sur ilin reflektigan cilindro; vere interese. La vespero alvenas! Ni vespermanĝis ĉe La Tablo, vegeterana restoracio ĉe okcidenta parto de Otavo, kiu estas la otava versio de Le Commensal. Ni bone manĝis kaj babilis ĝis je la 21<sup>a</sup>, kaj foriris por iri dormi.

Dimanĉe, ni vizitis la Muzeon



*Dum la MEKARo...*

*Fotografisto : Marc-Philippe Vincent*

# Kvara MEKARo...

## (sekvo de la unua paĝo)

*Martin Benoit*

pri Civilizacioj, en Gatino, trans la rivero Otava. Ni unue brunĉis en la manĝejo de la muzeo, kiun estis iom malfacile trovi, sed alveninte ni trovis jam alvenintajn Esperantistojn. Mi manĝis patkukojn. Ni vizitis la ekspozicion pri Petra, antikva urbo de Jordanio. Tre interesa civilizacio. Poste, Marc-Philippe kaj mi vizitis la daŭrajn ekspoziciojn, pri la indianaj vivmanieroj kaj afrikaj artaĵoj. Posttagmeze, pluraj el ni volis promeni, ĉar tiam la suno ekaperis! Gvidis nin Jean Alain, laŭ la rivero Otava kaj en la okcidenta parto de Gatino. Sufiĉe for de tradiciaj turistkaptejoj. Ni vagis tra parkoj, vidis ruinon de konstruaĵo, promenis en dormanta urbo. Vespere, ni ankoraŭ manĝis ĉe Carmello's, estis tiom bona gusta ! Babilis, bone manĝis...

Lunde matene, lasta aktivaĵo en la programo, brunĉo ĉe Merle kaj Guy Matte, en Orléans. Bela kaj granda domo. Manĝante, Merle kaj Guy Matte rakontis kiel ili renkontis unu la alian, en Esperanta kurso! Normando kaj Zdravka faris same, en Esperanta kongreso. Ĉiam interesa. Vere, formiĝas paroj pro Esperanto, tio mirigas min, ke simpla ideo kiel Esperanto povas tiom forte ligi homojn. Tio eble ne ŝajnas tia unuavide, sed konatiĝante kun Esperantistoj, mi trovis etan socion kies anoj estas ligitaj per komuna ideo, socion idealecan kiun mi ne trovas alimaniere. Poste, Guy montris al ni la « Esperantan ĉambron » kiu enhavas plurajn librojn, kaj eĉ la unuaj eldonoj de « Lumo » en 1900-aj jaroj. Mi ja sciis ke Esperanto estas centjara, sed jen la pruvo ke la ideo de

Esperanto trapasas generaciojn. Jen tempo foriri! Salutante ĉiujn, ni forveturas hejmen. Jen fino de bela semajnfino...

Al mi multe plaĉis la semajnfino. Entute ĝin partoprenis 25-o da Esperantistoj. La 4<sup>a</sup> MeKaRo plene sukcesis laŭ mi. Ĝi estis okazon ekkoni kun tiuj kiujn ni ne konas, kaj revidi tiujn kiujn ni jam konas.

Noto: en 2007 ne okazos MeKaRo, ĉar tiutempe en Kalgario okazas TutAmerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kaj Esperantistoj ankoraŭ ne eltrovis kiel duloki. Sed denove MeKaRo en Montrealo, en 2008!



**Société québécoise d'espéranto**  
**Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Vincent Riendeau (conseiller) .

*La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Vincent Riendeau (konsilanto).*

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2006.09.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca) • [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

Sylvain Auclair

Non, je ne vous entretiendrai pas ici de ces films dont la langue importe peu, mais de ces X qui, souvent, dans les courriels, remplacent les accents circonflexes et le petit crochet sur le *u*. Eh oui, ces fameux accents, qui ont été une des principales causes du célèbre schisme qui a donné naissance à l'Ido! (<http://fr.wikipedia.org/wiki/Ido>)

Je voudrais juste rappeler ici que, selon le Fundamento, la seule écriture alternative, quand les accents sont inaccessibles (le Fundamento ne parlait en fait que d'imprimeries qui ne disposeraient pas des fontes appropriées), est la suivante: *ch, gh, hh, jh, sh*, et, pour

le *ŭ*, on écrit simplement *u*. Cependant, pour des raisons de clarté, certains utilisent le *x*, une lettre qui n'existe pas en espéranto, et écrivent donc *cx, gx, hx, jx, sx* et *ux* (ou *vx*, pour éviter de se retrouver, après une transformation automatique vers l'orthographe standard, avec des *chevaŭ sur la rue de Bourdeaux*...).

Deux commentaires. Le premier : par fidélité au Fundamento, sans laquelle l'espéranto n'a plus de base stable, on ne devrait utiliser le système en *x* que dans la transmission électronique de textes; en d'autres termes, nous, humains, ne devrions à peu près ne jamais le voir. Le second: même

le système *zamenhofien*, en *h*, ne devrait être utilisé que lorsqu'il est impossible de faire autrement. De nos jours, par exemple, avec Unicode, on peut écrire du français, de l'espéranto et du turc dans la même phrase, sans négliger l'arabe ou même le chinois. Alors...

*En ordinaraj tekstoj oni tamen uzu la oficialajn supersignojn aŭ la H-metodon klarigitan ĉi-antaŭe. Anstataŭan skribon oni uzu nur en okazoj de nepra neceso.*

Tiré du Plena Manlibro de Esperanto Gramatiko:  
<http://bertilow.com/pmeg/>

## Assemblée générale annuelle

Boris - Antoine Legault

L'assemblée annuelle de la Société québécoise d'espéranto (SQE) aura lieu le 29 septembre 2006, à partir de 19h, à la Maison de l'espéranto de Montréal (6358-A, rue de Bourdeaux, Montréal). On y présentera le rapport de l'année écoulée et on y décidera des orientations de la SQE pour l'année 2007. Tous et toutes sont invité-e-s à participer à l'assemblée, cependant seul-e-s les membres de la SQE auront droit de vote.

## Jara kunveno

Boris - Antoine Legault

La jara kunveno de Esperanto-Societo kebekia (ESK) okazos en la 29a de septembro 2006, ekde la 19a horo, en Montreala Esperanto-Domo (6358-A, strato Bourdeaux, Montrealo). Oni pridiskutos la raportojn pri la pasinta jaro kaj decidos pri la celoj kaj agadoj de ESK por 2007 Ĉiuj bonvenas partopreni la kunvenon, tamen nur la membroj de ESK havos voĉdonan rajton.



*Renkonto ĉe L'Utopik  
Fotografisto : Présence Bouvier*

# Le Monde de l'Espéranto : ce que vous avez manqué

Sylvain Auclair

Moins d'une trentaine des membres de la SQE profitent de l'abonnement préférentiel au magazine français *Le Monde de l'Espéranto*. Alors, qu'ont donc manqué les autres? De quoi parle l'édition du mois d'avril passé?

Le principal dossier traite, en espéranto, du mouvement espérantiste en Italie; ceci en prévision du congrès mondial qui aura lieu, cet été, à Florence. On y apprend entre autres que ce n'est pas Zamenhof, mais bien plutôt Dante, qui aurait inventé l'espéranto... fait qui aurait été tenu secret par jalousie, l'italien sonnait évidemment beaucoup mieux que la langue internationale...

Après quelques nouvelles, plus locales, sur le mouvement espérantiste français (car LME

est aussi le journal officiel d'Espéranto-France) et un article sur la contribution des Italiens à la littérature espérantiste, on discute de la stratégie Internet d'Espéranto-France (ou plutôt de son absence) et on débat sur la pertinence de porter l'étoile verte en public. Finalement, une entrevue avec Reinhard Selten, espérantiste et Prix Nobel d'économie puis, dans la rubrique Carnet de voyage, un reportage sur le Vietnam.

De plus, un encart, intitulé *Okazas, les espérantophones s'activent en France*, indique comment *Tenir un stand sur un salon*, puis présente un calendrier des événements espérantistes en France et ailleurs dans le monde.

L'abonnement préférentiel est de 32 \$ pour six numéros.

# Hari Poter?

George Baker

Imagu « Hari Poter »-on kaj liaj amikojn, parolantajn Esperanton! La libraron de Hari Poter amas ĉiaj homoj, kaj ni kredas ke la Esperanta traduko prezentos la rakonton al novaj legantoj, kaj helpos ankaŭ disvastigi la lingvon.

Nun ekzistas bona traduko de la unua libro. Tamen, ni bezonas sondi la mendadon de tiuj libroj, kaj aranĝi eldonejon. Per nova retpaĝo, [www.hp-esperanto.com](http://www.hp-esperanto.com), ni celas kolekti sufiĉan nomliston por pruvi, ke la komunumo de Esperanto, ĝiaj amikoj, kaj tiuj dezirantaj pliajn tradukojn de Hari Poter havas la grandecon kaj intereson por igi tiujn librojn eldonindaj.

Ni antaŭdankas vin pro via subteno.

Fonto: [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

## Nouvel hébergeur

Boris - Antoine Legault

Le site web de la SQE ([www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)) est maintenant hébergé par l'entreprise à but non lucratif Koumbit (<http://koumbit.org>). À court terme, les usagers du site y verront principalement le changement suivant : l'adresse

apparaissant en haut de page débutera désormais toujours par [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca) et non plus par [www.esperanto.cam.org](http://www.esperanto.cam.org). À plus long terme, ce changement d'hébergeur permettra à la SQE de rendre son site encore plus

attrayant et professionnel. Une histoire à suivre... En attendant, assurez-vous que votre lien à la SQE pointe à la bonne adresse!

# Pri esperanta televido

*Boris - Antoine Legault*

---

Dum preskaŭ du monatoj (de komenco de aprilo ĝis fino de majo), la esperanta televida projekto ITV (<http://internacia.tv>) estis nefunkcia, pro manko da financaj rimedoj. Dum tiu periodo ekkazis kelkaj viglaj retaj diskutoj pri la plej bonaj manieroj funkciigi esperantan televidon.

Iuj opiniis ITV-on subteninda, kaj promesis donacadi monon al tiu projekto (vidu ekzemple la sukcesan promeson: <http://promesobanko.com/ITVsubteno>). Aliaj opiniis male, pro diversaj kialoj. Unu el tiuj, Axel Rousseau (Aksel Ruso), ne nur kritikis ITV-on, sed klopodis starigi propran esperantan televidejon, kune kun Emmanuelle Richard (Emanuel Riŝar). Ekde fino de aprilo, Farbskatol (<http://farbskatol.net>) ĉiusemajne proponas almenaŭ unu novan esperantlingvan filmeton. Pluraj el la filmetoj estas humuraj, nomindas ekzemple

Monpetado (parodio de Flavio Rebelo, la kreinto de ITV), Murdoj en la Kastelo (pri mortigo de krokodilemaj Esperantistoj en Greziona Kastelo) kaj Western (teatraĵeto filmita dum renkontiĝo IS 2002). Ankaŭ jam spekteblas filmetoj pri kuirarto, Ago-tago en Brazilo, reklamfilmo de kanada firmao Esperanto-Antaŭen, kaj pliaj. Post ĝia sukcesa starigo, iuj tamen indikis ke Farbskatol ne vere indas nomiĝi Reta televido, sed plej verŝajne Vlogo (t.e. video-blogo). Kvankam ITV nun ree funkcias, pro malofta aperigo de novaj programeroj iu proponis por ĝi la terminon Reta kinejo. Nu, eble la esperantistaro ne ankoraŭ havas veran Esperantan Televidon, sed interesaj retaj projektoj ja ekmontras la vojon...

Farbskatol: <http://farbskatol.net>  
Internacia televido: <http://internacia.tv>

# Nova gastiganto

*Boris - Antoine Legault*

---

La retejo de Esperanto-Societo Kebekia ([www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)) havas novan gastiganton, la neprofitcelan organizon Koumbit.org. La uzantoj ĉefe rimarkos la jenan ŝanĝon : ekde nun, en la supra adresujo de la krozilo ĉiam videblas [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca) kaj

ne plu [www.esperanto.cam.org](http://www.esperanto.cam.org). Krom tio, pro la nova gastiganto, ESK kapablos iom post iom plibeligi kaj pliprofesiigi sian retejon. Intertempe, certigu ke viaj ESK-a ligilo iras al la ĝusta adreso!

# Des adjectifs en espéranto

*Sylvain Auclair*

---

Quelle est la différence entre *parola* et *parolata*, ou en *loĝa* et *loĝata*?

Il faut se rappeler que les participes, comme ceux en *-ata* mentionnés ci-haut, dérivent de verbes. Par conséquent, il faut se rapporter au sens du verbe.

Prenons le premier exemple : *parola*, simple adjectif, signifie « qui se rapporte à la parole », c'est-à-dire « verbal » ou « oral », comme dans « contrat verbal » ou « examen oral ». (Attention, « verbal » peut aussi se dire *verba* en espéranto, quand il signifie : « qui se rapporte à un verbe ».) Par contre, *parolata* se rapporte au verbe « parler » : il signifie donc : « qui est dit » ou « qui est parlé ». *Lingvo parolata de malmultaj homoj* : une langue parlée par peu de gens. Mais : *parola stilo* : *style oral*, par opposition au style écrit. Ici, ce n'est pas le style qui est parlé ou écrit.

*Loĝata*, pour sa part, signifie « habité » (ce qui est un peu étrange, car le verbe *loĝi* ne peut pas avoir de complément direct...), comme dans : *urbo loĝata de cent mil homoj* : une ville habitée par cent mille personnes. *Loĝa* signifie : qui se rapporte au logement, à l'habitation. *Malbonaj loĝaj kondiĉoj* (ou *malbonaj loĝkondiĉoj*) : « mauvaises conditions de logement ». Des *loĝataj kondiĉoj*, ce « des conditions habitées », et je ne sais pas trop ce que ce serait...

# Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
ven. 30 <sup>a</sup> junio 2006	MEDO **	20 h	Agrikulturo, ekologio kaj GMO (OGM france)
ven. 29 <sup>a</sup> sept. 2006	MEDO **	20 h	Ĝenerala kunsido
6-9 <sup>a</sup> okt. 2006	Silvero (Usono)		ARE. Detaloj : vidu ĉe <a href="http://www.esperanto.qc.ca">www.esperanto.qc.ca</a>
ven. 27 <sup>a</sup> okt. 2006	MEDO **	20 h	Elektota temo
ven. 24 <sup>a</sup> nov. 2006	MEDO **	20 h	Elektota temo
sab. 16 <sup>a</sup> dec. 2006	Botanika Ĝardeno †	18 h	Decembra festo kaj komuna bufedo

**\*\* Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique):** 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement payant

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

**Por komentoj, proponoj, demandoj : [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)**

## Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. En voici les coordonnées.

Club d'espéranto de l'UdeM: [udem@esperanto.qc.ca](mailto:udem@esperanto.qc.ca)

McGill Esperanto Club: [mcgill@esperanto.qc.ca](mailto:mcgill@esperanto.qc.ca)

Club d'espéranto de l'UQAM: [uqam@esperanto.qc.ca](mailto:uqam@esperanto.qc.ca)

La Rano, club d'espéranto du Saguenay - Lac - Saint-Jean : [www.kvakejo.net](http://www.kvakejo.net)

MEMO, Montreala Esperanta Movado : [www.esperanto.org/montreal](http://www.esperanto.org/montreal)

Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à [riverego@esperanto.qc.ca](mailto:riverego@esperanto.qc.ca)